Informoj pri la 53-a ILEI-Kongreso en Kanado

La 53-a Internacia Kongreso pri Esperanto kaj Edukado okazos en Kebekurbo de la la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2020 kun komuna veturado al la 105-a UK en Montrealo poste.

Programskizo 2019-10-10

- sabato: bonvenigo en flughaveno de Kebekurbo kaj alveno al Universitato Laval (UL), gvidataj vizitoj (pluraj grupoj, laŭ horo de alveno) de kampuso kaj ĉirkaŭaĵoj, vespermanĝo libera (estas pluraj restoracioj proksime), frua enlitiĝo pro horzonŝanĝo.

- dimanĉo: solena malfermo, enkonduka prelego pri la kongresa temo « Interlingvistiko en universitatoj » prezentita de Prof. Duncan Charters, faka programo, frandvespero, ludo « Malkovru Amerikon » grupe.
- lundo: matene faka programo kaj komitatkunsido ; posttagmeze, gvidataj vizitoj de alta malnova urbo, komuna vespermanĝo en restoracio kaj "nacia vespero" en junulara gastejo
- mardo: matene faka programo kaj komitatkunsido; posttagmeze, lingvofestivalo kaj sporta evento en kontakto kun la publiko; libera vespero (homoj kiuj volas sperti kebekan noktan vivon povos veturi denove al urbocentro...)
- merkredo: buso je 9h al indiĝena vilaĝo, duhora vizito de muzeo, promeno en Wendake kaj tagmanĝo tie ; vidu https://eo.wikipedia.org/wiki/Vendako ; per buso al akvofaloj Montmorency kaj promeno tie; vizito de malalta malnova urbo kaj vespermanĝo tie.
- ĵaŭdo: Komitatkunsido kaj faka programo., bankedo kaj balo.
- vendredo: faka programo ; je la 16-a horo konkluda momento ; libera vespermanĝo ; solena fermo inkluzive arta programo : 20-a ĝis 22-a horo.
- sabato: je 10h buso al Tririvero, promeno kaj tagmanĝo tie (restoracio "Mondo"), buso al Montrealo. Aŭ : buso je 8h00 por atingi Montrealon je la 12-a horo por Komitatanoj, kiuj devas kunsidi je la 14-a horo.

Ni opinias, ke ILEIanoj ege ŝatos Kebekurbon.
Iam dum la semajno okazos renkontiĝo kun la partoprenantoj de la antaŭkongreso de UK.